

# 110-a Universala Kongreso de Esperanto

Brno (Burno), Ĉeĥio
26 julio – 2 aŭgusto 2025

# DUA BULTENO

**KONGRESA TEMO**
Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj



# Enhavo


Loka Kongresa Komitato ....4
Bonvenon al la kongresurbo ....5
La kongresejo ....9
Utilaj informoj pri Ĉeĥio kaj Brno ....10
Provizora programo ....14
Kongresa temo ....15
KER-ekzamenoj de UEA ....16
Paroligaj kursoj kun *edukado.net* ....17
Ĝeneralaj kondiĉoj de mendado ....18
Hoteloj ....21
Ekskursoj ....27
  Antaŭkongresa ekskurso ....27
  Postkongresa ekskurso ....30
  Ekskursoj dum la kongresa semajno ....33
    Tuttagaj ekskursoj ....33
    Duontagaj ekskursoj ....42
  Tabelo de dumkongresaj ekskursoj ....48
Bankedo ....49
Aranĝoj ĉirkaŭ la UK ....50
Pliaj informoj ....51
Sekvu nin ....52
Kontaktoj ....53



Teksta parto en la ĉapitroj "Bonvenon al la kongresurbo" kaj "Utilaj informoj pri Ĉeĥio kaj Brno" estas disponebla laŭ CC BY-SA 4.0.



Fotoj: Centro de turismo – Suda Moravio (Centrála cestovního ruchu – Jižní Morava), AVC MENDELU, Hotel Continental Brno, Hotel International Brno, TIC BRNO, Unsplash, personaj arkivoj.

110-a Universala Kongreso de Esperanto

Brno (Burno), Ĉeĥio, 26 julio - 2 aŭgusto 2025

# DUA BULTENO

KONGRESA TEMO

## Esperanto kaj teknologioj
## kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj

# Loka Kongresa Komitato (LKK)

| | |
|---|---|
| **Prezidanto:** | Jiří Tomeček |
| **Vicprezidanto & giĉetoj:** | Libuše Hýblová |
| **Sekretario & kongresejestro:** | Milan Kolka |
| **Kasisto:** | Andrea Švubová |
| **Sponsoroj / partneroj:** | Miroslava Tomečková |
| **Loĝiga servo:** | Vratislav Hirš |
| **Kontaktoj kun amaskomunikiloj:** | Jiří Caletka |
| **Sociaj retejoj:** | Josef Kalčík |
| **Kontaktoj kun landaj aŭtoritatoj:** | Tomáš Břicháček |
| **Kontaktoj kun lokaj aŭtoritatoj:** | Marek Blahuš |
| **Artaj aranĝoj:** | Leonarda Chaloupková |
| **Ekskursoj:** | Jana Zigal |
| **Junulara programo:** | Paulína Jalakšová |
| **Infana kongreseto:** | Monika Kimáková |
| **Volontuloj / helpantoj:** | Vlasta Pištíková |
| **Kongresa Kuriero:** | Miroslav Malovec |
| **Teĥniko / poŝtelefona aplikaĵo:** | Petr Javorik |

# Bonvenon al la kongresurbo

Bonvenon al Brno, la urbo de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto!

Brno estas la dua plej granda urbo en Ĉeĥio post la ĉefurbo Prago. Kun proksimume 400 000 loĝantoj, Brno estas sufiĉe granda por prezenti viglan kaj interesan urban vivon, sed samtempe sufiĉe malgranda por krei varman kaj bonvenigan etoson.

Brno estas riĉa je historio kaj kulturo, kio videblas en ĝiaj arkitekturaj vidindaĵoj - de la historia burgo Špilberk kaj la Katedralo de Petro kaj Paŭlo (kiu aperas en la emblemo de la UK!) ĝis la fama Vilao Tugendhat. Legu pli en la sekcio "Ekskursoj"! Dum la kongreso, vi ĝuos la unikan etoson de Brno, kie la historia heredaĵo harmonie kuniĝas kun moderna evoluo.

Universala Esperanto-Asocio kaj la Loka Kongresa Komitato invitas vin veni al tiu ĉi mirinda urbo kaj ĝui la kongresan semajnon plenan je memorindaj spertoj.

### Dokumentoj, vizoj

Ĉiu vizitanto devas havi validan identigilon, kaj tiuj de landoj ekster la Ŝengen-areo devas havi pasporton validan minimume tri monatojn post la forirdato, koncernajn vizon kaj asekurojn, samkiel revenbileton. Bonvolu noti, ke la reguloj pri vizdonado malsamas laŭ landoj kaj ke ili ofte ŝanĝiĝas. La kongresanoj mem devas zorgi pri akiro de vizoj. Bonvolu konscii, ke nek la KF nek LKK povas influi la decidojn de la konsulejoj.

Ĉiu kongresano povas elŝuti la oficialan invitilon – konfirmon de sia aliĝo – uzante la mendilon. Ĝi devas sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleteron nek aliajn konfirmaĵojn. Bv. noti, ke la konfirmaĵo povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresdaŭro. Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private. Se vi mendis loĝadon pere de UEA, oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri pagitaj servoj.

### Eniro en Ĉeĥion

Ĉe la paĝaro *mallonge.net/1jo* troveblas la informoj por eniri Ĉeĥion el diversaj landoj. Se oni ricevas la Ŝengen-vizon, oni povas libere cirkuli en la aliaj Ŝengen-ŝtatoj. Por la vizoj oni povas peti ne pli frue ol 6 monatojn antaŭ la vizito kaj ne pli malfrue ol 15 tagojn antaŭ la vizito. Kutime estas bezonata persona vizito de la konsulejo en la lando, kies civitano vi estas. Listo de landoj, kies civitanoj ne bezonas vizon, troveblas ĉe *mallonge.net/1jp*

### Asekuroj

Por trankvila restado, konsilindas havi vojaĝ-sanasekuron, ĝi ebligas al vi bone protektiĝi dum la restado en la kongreslando. UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj. Ekde aprilo 2022 ne plu estas bezonataj iuj ajn kondiĉoj kaj atestilo koncerne la malsanon KOVIM-19.

## Alveno al Brno kaj al la kongresejo

**Aviadile.** La plej proksimaj grandaj internaciaj flughavenoj estas en Vieno, Prago kaj Bratislavo. Brno estas bone atingebla trajne kaj buse de ĉiuj tiuj ĉi urboj.

- Vieno (VIE) – Aŭstrio
  - Buse: rektan buson de la flughaveno al Brno proponas *Gepard Express*, *Flixbus* kaj *RegioJet*.
  - Trajne: de la flughaveno eblas preni trajnon al *Wien Meidling* aŭ *Wien Hauptbahnhof* (ĉefa stacidmo) kaj poste preni rektan trajnon al Brno.

- Prago (PRG) – Ĉeĥio
  - Buse: rektan buson al Brno proponas *Gepard Express*.
  - Trajne: necesas unue preni buson aŭ taksion al la ĉefa stacidomo *Praha hlavní nádraží* kaj poste preni rektan trajnon al Brno.

- Bratislavo (BTS) – Slovakio
  - Buse: ne estas rekta buso, necesas unue preni buson aŭ taksion al la busa stacidomo (*Bratislava Autobusová stanica Nivy*) kaj de tie preni rektan buson de *Flixbus*, *RegioJet* aŭ *Slovak Lines*.
  - Trajne: necesas unue preni buson aŭ taksion al la ĉefa stacidomo *Bratislava hlavná stanica* kaj poste preni rektan trajnon al Brno.

- Brno (BRQ) – Ĉeĥio
  - Brno havas propran malgrandan internacian flughavenon kun regulaj flugoj al Londono, Malago kaj Bergamo. Somere funkcias flugoj ankaŭ al suda Eŭropo kaj Egiptio.
  - De la flughaveno eblas atingi la urbocentron per la buso E76 aŭ taksio.



**Trajne.** Brno havas rektan trajnan konekton kun Prago, Berlino, Hamburgo, Vieno, Bratislavo kaj Budapeŝto. Per unu trajnŝanĝo estas atingeblaj multaj aliaj urboj en Centra Eŭropo. Pli da informoj pri la itineroj kaj biletoj troviĝas ĉe *cd.cz*, *bahn.de*, *tickets.oebb.at*, *slovakrail.sk* kaj *mavcsoport.hu*. La ĉefa stacidomo en Brno estas *Brno-Hlavní nádraží*, ĝi troviĝas en la urbocentro.

**Aŭtobuse.** En Brno estas du busaj stacidomoj. La stacidomo *Brno-hotelo Grand* estas en la urbocentro apud la trajna stacidomo. Multaj internaciaj buslinioj alvenas ĉi tien. La stacidomo *Zvonařka* estas sude de la trajna stacidomo. Vi povas trovi buskonektojn ĉe *flixbus.cz*, *regiojet.com*, *slovaklines.sk* kaj aliaj buskompanioj.

**Aŭte.** Brno estas atingebla aŭte per aŭtovojoj el *Katowice* (Pollando), Prago, Bratislavo (Slovakio) kaj Vieno (Aŭstrio). Tuj apud la kongresejo ne troviĝas granda parkejo. Apudaj parkejoj estas precipe uzataj de la loĝantaro de proksimaj domoj. Por vizitantoj ĝi estas pagenda nokte de la 17a ĝis la 6a horo. Se vi alvenos aŭte, ni rekomendas lasi la aŭtomobilon en la hotela parkejo kaj en Brno veturi per publika transporto.

Parkejo por **ruldomoj** troviĝas ĉ. 6 km for de la kongresejo kaj proponas gruzan areon por parki, herbejon por malstreĉiĝi, kaj havas banĉambrojn, duŝejojn, infanludejon kaj senpagan retkonekton. Oni pagas per pagmaŝino, ĝi akceptas nur kontantan monon en eŭroj (monbiletojn de 5€, 10€ kaj 20€ kaj monerojn de 1€ kaj 2€) kaj redonas ŝanĝon per moneroj. Prezo: 21€/nokto, 7€ por elektro. *Klaku ĉi tie por pliaj informoj*.

**Bicikle.** BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia) proponas kunordigi biciklan vojaĝon al UK kaj havas planojn por biciklado al Brno de Vieno (150-175 km, en 3 tagoj) kaj de Prago (250-280 km, en 6 tagoj). Por pliaj informoj vizitu *bemi.tejo.org* aŭ kontaktu *bemi-estraro@tejo.org*.



## Kiel atingi la kongresejon per publika transporto

Estas konsilinde unue veturi al la elektita hotelo, deponi la valizojn, kaj poste de tie atingi la kongresejon. Se tamen vi unue iros al la kongresejo, sube vi trovos utilajn informojn.

La plej proksimaj haltejoj al la kongresejo estas la bushaltejo *Erbenova* kaj la tramhaltejo *Zemědělská*.

Unue, veturu al la ĉefa stacidomo – *Hlavní nádraží*.

Se vi alvenas aviadile al Brno, prenu aŭtobuson E76 kun la direkto *Hlavní nádraží*. Vi alvenos al la aŭtobusa stacidomo antaŭ la hotelo Grand, kiu estas apud la ĉefa trajna stacidomo.


Se vi alvenos aŭtobuse al la stacidomo *Zvonařka*, veturu per tramo numero 12 du haltejojn en la direkto *Technologický park* ĝis la haltejo *Hlavní nádraží*.

La tramhaltejo *Hlavní nádraží* troviĝas rekte antaŭ la trajna stacidomo. Ĝi estas apud la busa stacidomo Hotelo Grand, kie haltas multaj internaciaj busoj kaj kie ankaŭ estas la finhaltejo de buso E76 el la flughaveno.

De la tramhaltejo *Hlavní nádraží* al la kongresejo vi povas veturi per tramoj numero 7 (direkto *Zemědělská*) aŭ 9 (direkto *Lesná*, *Čertova rokle*) ĝis la haltejo *Zemědělská*. La veturo daŭras 13 minutojn. La tramoj 7 kaj 9 veturas en kontraŭaj direktoj (7 dekstren, 9 maldekstren), ĉar ili ĉirkaŭveturas la urbocentron tra diversaj vojoj, sed ĉe la strato *Jugoslávská* iliaj trakoj kuniĝas kaj daŭras al la haltejo *Zemědělská* tra la sama strato.

De la studenthejmo JAK oni veturas per la buso 46 de *Štefánikova čtvrť* ĝis *Erbenova* – la bushaltejo tuj apud la kongresejo.

Paperaj biletoj validas ankaŭ dum ŝanĝo de la veturilo. Uzu 60-minutan bileton, se vi veturas de la flughaveno aŭ busa stacidomo *Zvonařka*. Por veturo de la stacidomo sufiĉas 15-minuta bileto. Pliaj informoj pri la biletoj troviĝas sube en "Utilaj informoj".



# La kongresejo

La kongresejo estas la Universitato de Mendel (mallonge “Mendelu”), la konstruaĵoj „X“ kaj „Q“:

## La adreso estas:

**Mendelova univerzita v Brně**
**Zemědělská 1665/1**
**613 00 Brno**
**Ĉeĥio**

Tiu ĉi universitato estas la plej malnova agrikultura universitato en Ĉeĥio, pasintjare ĝi festis sian 105-jariĝon. Nuntempe ĝi estas moderna universitato, kiu havas diversajn fakultatojn kaj ĉ. 10 000 studentojn.

Ni kongresos en la konstruaĵo de la Ekonomia Fakultato („X“), kie troviĝas diversgrandaj prelegsalonoj kaj kafejo kun manĝetoj, trinkaĵoj kaj kafo. En la tuj apuda konstruaĵo “Q” troviĝos libroservo kaj manĝejo. Ambaŭ konstruaĵoj estas novaj, modernaj, klimatizataj kaj havas liftojn.

La universitata manĝejo funkcios pro servi tag- kaj vespermanĝojn por la kongresanoj provizante riĉan elekton por ĉionmanĝantoj, vegetaranoj kaj veganoj. La manĝojn oni elektas laŭplaĉe kaj pagas fine laŭ la pezo. Eblos pagi kontante en ĉeĥaj kronoj aŭ per karto.





Fotoj: AVC MENDELU

**La salonon Zamehof** gastigos *Zoner Bobyhall* – moderna koncertejo, kiu troviĝas nur 800m for de la kongresejo en la sama konstruaĵo, kie estas H1 *Hotel Cosmopolitan Bobycentrum*.

**Zoner Bobyhall**
**Sportovní 559/2A**
**612 00 Brno**
**Ĉeĥio**

**Nacia vespero** estas planata en la burgo *Špilberk* sur la samnoma monteto.

**Špilberk 210/1**
**602 00 Brno**
**Ĉeĥio**

**Por kongresrilataj aferoj bv. skribi nur al kongresoj@co.uea.org.**

# Utilaj informoj pri Ĉeĥio kaj Brno

**En la Esperanta Vikivojaĝo vi povas trovi:**

- detalajn turismajn informojn pri Ĉeĥio: *https://w.wiki/CqeH*
- pri Brno: *https://w.wiki/CqeL*
- praktikan konversacian frazlibron de la ĉeĥa lingvo: *https://w.wiki/CqeP*

### Geografio

Ĉeĥio konsistas el tri historiaj landoj, nome Bohemio okcidente, Moravio oriente kaj ĉeĥa Silezio nordoriente. La ĉefurbo Prago kuŝas en la centro de Bohemio, dum Brno estas metropolo de Moravio. Aliaj gravaj urboj en Moravio estas Olomouc, Ostrava, Zlín.

### Historio

En la 9-a jarcento formiĝis la princlando Granda Moravio (Bohemio, Moravio, Silezio, Slovakio, Panonio) kun la ĉef-urbo Nitra. Ĝin en 906 detrue invadis hungaroj, kiuj ekloĝis en Panonio, kaj ankaŭ Slovakio restis dum mil jaroj sub ilia potenco. Bohemio, Moravio kaj suda Silezio formis la tri landojn de la "Bohemia krono", unue princa, post 1158 reĝa. Post la ĉeĥa dinastio de Primislidoj (ĝis 1306) regis tie Luksemburgoj (ĝis 1437), mallonge ĉeĥa reĝo Georgo el Poděbrady, sekvis la litova-pola dinastio Jagelonoj (1471-1526) kaj la aŭstraj Habsburgoj (1526-1918). En 1918 ekestis Ĉeĥoslovakio, kiu en 1993 dividiĝis je Ĉeĥio kaj Slovakio.

### Klimato

Ĉeĥio havas mildan klimaton, tamen somere la temperaturo povas atingi eĉ 33°C.

### Loka tempo

UTC+2 (somere).

### Mono

En Ĉeĥio oni pagas per ĉeĥaj kronoj (internacia mallongigo: CZK, ĉeĥlingva mallongigo: Kč). Monbiletoj: 5000, 2000, 1000, 500, 200 kaj 100 kronoj. Moneroj: 1, 2, 5, 10, 20 kaj 50 kronoj. Krono dividiĝas je cent heleroj, sed heleraj moneroj ne ekzistas. Se aperas prezo 29,40 CZK, ĝi estas rondigita al 29 CZK. Se 29,50 CZK, tiam al 30 CZK. En la urbo ĉe multaj stratoj estas bankaŭtomatoj de pluraj bankoj. Ĉiuj hoteloj, restoracioj, vendejoj (krom la malgrandaj) akceptas bankokartojn, Visa kaj Mastercard estas la plej uzataj. Tamen estas konsilinde havi kun si kontantan monon. Ekzistas ankaŭ monŝanĝejoj nomataj

“Směnárna – Exchance – Wechselstube – Cambio» en diversaj partoj de la urbo. La kurzoj ŝanĝiĝas, sed proksimume validas:

1 € = 25 CZK
1 US$ = 24 CZK

Neniam akceptu ŝanĝoproponon faritan de hazardulo kiu alparolis vin surstrate, ĉar temas pri trompo.

### Elektro



La elektra tensio estas 230-volta. La elektringoj uzataj en Ĉeĥio estas samaj kiel en Francio (tipo E) kaj kongruaj kun tiuj de Germanio (tipo F).

### Telefonado

La prefikso por telefoni de alilando al Ĉeĥio: +420, sekvata de 9-cifera telefonnumero.

### Interreto

Vifio estas kutima en hoteloj, gastejoj, restoracioj, sed ne surstrate.

### Medikamentoj

Se vi uzas preskribitan medikamenton, bonvolu kunporti kuracistan recepton aŭ la folieton, kiu akompanas la medikamenton kaj entenas ĝian kemian priskribon/nomon. Informoj haveblas ĉe la informa budo de la kongresejo. Apoteko en la ĉeĥa lingvo havas la nomon *Lékárna*.

### Sanservo

Eksterlandanoj havu taŭgan konfirmilon pri sanasekuro. LKK kaj UEA ne respondecas pri asekuro de la kongresanoj. Okaze de sanproblemoj aŭ medicina bezono oni anonciĝu en la informejo.

### Trinkakvo

La kranakvo estas trinkebla. En vendejoj kaj hoteloj eblas aĉeti mineralan akvon:

– *perlivá* – kun gaso (kutime markita per ruĝa koloro)
– *mírně perlivá* – milde gasa (verda)
– *neperlivá* – sen gaso (blua)

Dulitra botelo da akvo kostas ĉ. 20 CZK.

### Trinkejoj

La prezoj varias depende ĉu oni trinkas en surstrataj kioskoj aŭ en luksaj trinkejoj. La kromprezo povas esti kompreneble pli alta. En ĉiu trinkejo (plejofte ĉe la verŝtablo) pendas tabulo-menuo, sur kiu estas indikitaj la prezoj de la proponataj varoj. En restoracioj kutime oni disponigas menuon kun prezoj.

**Trinkaĵoj**

– Teo nigra aŭ "frukta" (fakte: herba infuzaĵo).

– Kafo: "turka", "viena" (turka kun laktokremo), espreso aŭ kapuĉino.

– Biero: bonaj bieroj estas vendataj preskaŭ ĉie, lokaj markoj estas Starobrno, Hauskrecht, Černá Hora.

– Vino: la tuta regiono de Suda Moravio estas famega pro siaj bonaj vinoj, pli ol 96% de vinejoj en Ĉeĥio situas en Suda Moravio.



**Trinkmono**

Ĝi ne estas deviga, sed estas aprezata kaj kutima.

**Publika transporto**

En Brno veturas tramoj, busoj kaj trolebusoj.

Personoj pli-ol-70-jaraj veturas per publika trafiko senpage, sed ili devas havi dokumenton pri la aĝo (ekz. pasporton, legitimilon kun foto).

Bileton eblas antaŭaĉeti en aŭtomatoj kaj post la eniro en veturilon necesas ĝin stampi en speciala biletmarkilo (ili troviĝas ĉe ĉiu pordo). Paperaj biletoj validas ankaŭ dum ŝanĝo de la veturilo.

La tipo de la bileto dependas de la longeco de la vojaĝo.

15 minutoj – 20 CZK
60 minutoj – 25 CZK
90 minutoj – 27 CZK

Oni povas pagi ankaŭ per bankokarto, por tio bezonatas almeti ĝin al la sama biletmarkilo, tiel vi aŭtomate pagos la 60-minutan bileton kontraŭ 25 CZK. Se vi volas pli mallongan bileton por 20 CZK, vi devas almeti la karton denove ĉe eliro.

### Taksio

Kalkulu 60 CZK + 36 CZK por ĉiu kilometro, 7 CZK por ĉiu minuto da atendado. Multaj hoteloj kaj restoracioj estas je piedira distanco de la kongresejo. En Brno funkcias taksiaplikaĵoj Bolt kaj Uber.

### Sekureco

Ĉeĥio estas ĝenerale sekura lando. Kiel en ĉiuj grandaj urboj, estu atentema pri dokumentoj, valoraĵoj, mono ktp kaj apliku la bazajn sekurecajn regulojn por vojaĝantoj.

La telefonnumero por ĉiuj gravaj krizaj okazoj estas 112, pliaj estas 158 (polico), 150 (fajrobrigado) kaj 155 (medicina helpo).

### Vendohoroj

La plej multaj grandaj vendejoj kaj magazenoj funkcias de la 8h30 ĝis la 21h00, ankaŭ sabate kaj dimanĉe. Aliaj grandaj vendejoj en la urbo funkcias de la 8h30 ĝis la 17h00. Etaj vendejoj, aparte por turistoj, restas malfermitaj ĝis la 22h00 kaj ofte ankaŭ dimanĉe.

### Brno piede

La kongresejo troviĝas proksime al la urbocentro. Vi povas promeni libere tra la stratoj de Brno kaj orientiĝi per poŝtelefonaj mapoj / navigiloj kiel OsmAnd aŭ Google Mapoj.

OsmAnd eĉ havas interfacon en Esperanto, la nomon de pluraj lokoj ĝi montras en Esperanto, funkcias sen interreto (se vi anticipe elŝutas la mapon por la areo), kaj taŭgas ankaŭ por piedirantoj. Ĝi disponeblas en la apvendejoj de Android kaj iOS, kaj ĉe *osmand.net*. Se vi (por Android) unue instalas la apvendejon F-Droid (de *f-droid.org*), vi povas per ĝi instali OsmAnd+ kun senlima eblo elŝutadi novajn mapojn. Por agordi Esperanton interfaca lingvo, klaku al la burgera menuo (☰) sube maldekstre, Agordoj > Ĝeneralaj agordoj > Lingvo de aplikaĵo (Display language), elektu Esperanton kaj konfirmu.



# Provizora programo

**Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.**

| | |
|---|---|
| **26-a de julio, sabato** | Malfermo de la kongresejo je 9h00. Registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj. Libroservo. Movada Foiro. Giĉetoj funkcias ĝis 18h00. |
| **27-a de julio, dimanĉo** | Solena Inaŭguro (10h00). Libroservo. Kongresa Temo. Inaŭguro de IKU/AIS. Ekumena Diservo. Nacia Vespero. |
| **28-a de julio, lundo** | Libroservo. IKU-prelegoj. E-kursoj. Kleriga Lundo. Societo Zamenhof. Bankedo. Kongresa Balo. |
| **29-a de julio, mardo** | Libroservo. Esperanto-kursoj. Tago de Lernado. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Estraro respondas. Koncerto/Teatraĵo. |
| **30-a de julio, merkredo** | Tuttagaj ekskursoj (kongresejo fermita). |
| **31-a de julio, ĵaŭdo** | Libroservo. Libroj de la Jaro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Esperanto-kursoj. Koncerto/Teatraĵo. |
| **1-a de aŭgusto, vendredo** | Libroservo. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. KER-ekzamenoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Venontaj UK-oj. Internacia Arta Vespero. |
| **2-a de aŭgusto, sabato** | Solena Fermo (10h00). Fermo de la kongresejo (12h00). |



# Kongresa temo

## Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj

Unuiĝintaj Nacioj (UN) deklaris 2025 kiel Internacian Jaron de Paco kaj Konfido por antaŭenigi tutmondan unuiĝon kaj instigi ĉiujn nin pensi kiel alfronti la multajn krizojn, kiujn la mondo trapasas. La Ĝenerala Sekretario de UN, António Guterres, emfazas la bezonon de nova komenco, substrekante la gravecon de homaj rajtoj, unuiĝo kaj solidareco por konstrui pli pacan kaj stabilan estontecon.

Tiu deklaro celas kuraĝigi landojn kaj homojn kunlabori por solvi konfliktojn, redukti malegalecojn kaj antaŭenigi financan kaj klimatan justecon. UN kredas, ke per fortigado de reciproka fido kaj internacia kunlaboro eblas krei pli harmonian kaj sekuran medion por ĉiuj. Konsiderante, ke Esperanto – neŭtrala internacia lingvo parolata en pli ol 130 landoj – jam de pli ol 137 jaroj servas kiel ilo por interkultura kompreniĝo, kaj ke lastatempe teknologioj fariĝis nemalhaveblaj por konekti homojn tra la mondo, la 110-a Universala Kongreso de Esperanto pere de sia temo esploros la rolon de Esperanto kaj de modernaj teknologioj kiel pontoj por antaŭenigi pacon kaj konfidon inter la popoloj.

La forto de Esperanto estas kaj en la aspektoj de la lingvo – neŭtrala, inkluziveca, pli facile kaj malmultekoste lernebla – kaj en la kernaj valoroj ĉirkaŭ ĝi kaj ĝia kulturo – interkompreniĝo, justa komunikado, solidareco, pacismo kaj internaciismo. Kombinante tiun forton kun la nuntempa potenco de teknologioj, ni kreas novajn eblojn por internacia kunlaboro, reciproka kompreno kaj edukado por pli paca mondo.

Dum la kongreso ni esploros la diversajn manierojn kiel teknologioj povas subteni la kapabligon kaj konsciigon de homoj pri la temoj, kiuj fortigas pacon kaj konfidon. Ni diskutos pri tio, kiel ciferecaj platformoj, sociaj retoj, virtualaj komunumoj kaj neŭtrala lingvo povas ebligi al homoj tutmonde konektiĝi kaj pli facile internaciskale kunlabori. Ni ankaŭ analizos kiel teknologioj povas esti uzataj por instrui Esperanton kaj faciligi lernadon pri lingvoj kaj kulturoj, tiel plifortigante la rolon de Esperanto kiel ilo por paco.

Tamen ni ankaŭ atentos pri la danĝeroj de misuzo de teknologio. Necesas konstrui kaj teni konscion pri la nepra bezono pri etiko en la uzado de teknologioj, kiel same batali kontraŭ falsaj novaĵoj kaj la dissemado de malamo. Ni devas certigi, ke niaj komunikrimedoj estas uzataj por konstrui pontojn, ne barojn, kaj ke ili kontribuas al socia inkluziveco en mondo teknologie konektita, por ke neniu restu eksterlasita. Pere de tiu temo ni ankaŭ diskutos pli amplekse pri tio kiel ciferecaj rimedoj povas esti uzataj por emancipa edukado, ĉefe por ke pacemo regu en la mensoj de la homoj.

Fine ni konatiĝos kun konkretaj ekzemploj de projektoj kaj iniciatoj, kie Esperanto kaj teknologioj estis uzataj por antaŭenigi pacon kaj konfidon. Ni aŭdos de aktivuloj kaj fakuloj, kiuj dividos siajn spertojn kaj sukcesojn en ĉi tiu kampo. Tiuj rakontoj inspiros nin kaj montros, kiel ni ĉiuj povas kontribui al pli paca mondo per la uzo de Esperanto kaj teknologioj.

Interesiĝantoj kontribui al la temo jam povas kunlabori per la dissendolisto *KongresaTemo@Groups.io*.

Ni invitas ĉiujn, kiuj volas kontribui, aktive kundividi siajn ideojn, atendojn kaj spertojn, por ke ni kune povu konstrui pli pacan kaj kunlaboran estontecon.

*Fernando Maia Jr.,*
*Vicprezidanto de UEA, estrarano respondeca pri Kongresoj*



# KER-ekzamenoj de UEA je kvar niveloj

UEA denove okazigas dum la kongreso ekzamenojn, bazitajn je la Komuna Eŭropa Referenckadro. Estos ekzamenoj je la konataj niveloj B1, B2, C1 kaj C2.

Je ĉiu nivelo okazos skribaj kaj parolaj ekzamenpartoj. Ĉi-lastaj konsistas el aŭdkomprenaj taskoj kaj antaŭkomisionaj buŝaj ekzamenoj (intervjuoj).

**Je C2-nivelo paralele kun la kongreso, en la sama tago okazos ankaŭ reta ekzameno por tiuj, kiuj ne povos aperi fizike.**

La priskribo de la enhavo kaj la postularo pri la unuopaj ekzamenniveloj konsulteblas en la ekzamenpaĝo de *https://edukado.net/ekzamenoj/ker*.

**La ĉefa ekzamentago estos vendredo, la 1a de aŭgusto**, kiam okazos laŭvice la skribaj kaj aŭdkomprenaj ekzamenoj je ĉiuj niveloj.

La nombro de lokoj por la parolaj intervjuoj dum la kongreso estos limigita, sed eblos trapasi ilin rete, pere de Zoom en elektita tempo jam en julio kaj ankaŭ dum la tuta aŭgusto. Fruaj aliĝintoj havos pli da ebloj elekti sian intervju-tempon.

Interesiĝantoj vizitu la specialan kongresan ekzamenpaĝon *https://edukado.net/ekzamenoj/ker/uk* aŭ informiĝu ĉe la adreso *ker-ekzamenoj@edukado.net*.

**Aliĝi necesas antaŭ la ekzameno.**

La 15-a de junio estas la limdato por aliĝi al la kongresaj ekzamenoj kaj pagi la kotizon. Koncerne la C2-nivelon ĝis tiu dato necesas, ke kuniĝu minimume 15 kandidatoj, aliokaze la sesio en tiu nivelo ne povos okazi.

La ekzamenkotizoj varias laŭ la landkategorioj de la membrokotizoj de UEA. Pri la pagenda sumo kaj pagmanieroj atendu la fakturon de UEA. Por dumkongresa aliĝo kaj/aŭ pago estos kalkulataj kromkostoj.

**Subvencioj**

Ni atentigas, ke TEJO kaj *edukado.net* kaj kelkaj landaj asocioj (ekz. la franca, brita kaj usona) disponigos subvenciojn por siaj kandidatoj.

**Prepar-sesioj**

La teamo de *edukado.net* okazigos en majo preparsesiojn rete, kaj en la programo de la Kleriga Lundo Katalin Kováts, gvidanto de la KER-Ekzamena Centro, okazigos informprogramon pri la sesioj, dum kiu eblos vidi specimenojn, ricevi konsilojn kaj starigi demandojn.



# Paroligaj kursoj kun edukado.net

La porinstruista retejo *edukado.net* denove gvidos du paralelajn paroligajn kursojn – dufoje tage dum kvar tagoj.

La lecionoj de la unua grupo, kiun gvidos Katalin Kováts, celas **komencantojn kaj komencintojn (A1, A2)**, kiuj havos sinsekvajn 8 lecionojn. La kursmaterialo estos la libreto Poŝamiko, kiun eblos aĉeti en la libroservo aŭ en la kursosalono. La ĉeestintoj de ĉiuj ok partoj ricevos fine atestilon pri la partopreno. Observantoj bonvenas.

Por la **meznivelaj (B1, B2) parolantoj de Esperanto** estos same ok sesioj, sed laŭtage la sinsekvaj aranĝoj estos ripetoj, do, sufiĉas partopreni tage nur unu lecionon. La kurson por mezniveluloj gvidos Sylvain Lelarge.

Antaŭa aliĝo al la lecionoj ne necesas.

# Ĝeneralaj kondiĉoj de mendado

La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj en la reta mendilo kaj en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Bonvolu nepre legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

### Bazaj informoj

UK akceptas mendojn nur de registritaj kongresanoj. Registrita kongresano estas konsiderata tiu, kiu ricevis konfirmon pri sia aliĝo kun la kongresa numero. Kongresanoj indikas siajn personajn informojn, kaj UK ne respondecas pri eventualaj mismendoj kaŭzitaj pro manko aŭ malĝusteco de tiuj informoj. UK devigas sin liveri ĉiujn servojn laŭ la priskriboj en la Dua Bulteno kaj ne respondecas pri (ne)plenumo de nemenciitaj servoj.

### Loĝado

Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la loĝejo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la foriro de la loĝejo, do, la daton de la lasta mateno en ĝi.

Principe, eblas okupi ĉambrojn ekde la 14h00 de la mendita dato kaj endas forlasi la ĉambrojn ĝis la 10h00 de la lasta tago. Se pro iu kialo (e.g. malfruo de flugo) oni ne sukcesas alveni dum la unua mendita tago, nepre bezonatas sciigo per *kongresoj@co.uea.org* por ke la hotelo konservu vian mendon. Se vi ne okupos ĉambron dum la unua mendita tago, oni rajtas nuligi la rezervon kaj vi povas perdi la plenan pagitan sumon por la tuta restadperiodo.

### Hazarda kunloĝigo

Eblas mendi 1 liton en dulitaj ĉambroj nur en la studenthejmo H4-H5, tiel vi akceptas loĝi kun alia kongresano en la ĉambro.

Dulitajn ĉambrojn oni disponigas nur al homoj, kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi la trovon de kunloĝanto al homoj, kiuj nepre volas loĝi en dulitaj ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, ni rekomendas uzi la telegraman grupon de UK: *https://uk.telegramo.org/.*

### Frueco de la mendo kaj alternativoj

Ĉar la mendeblaj litlokoj ne estas senlimaj, kaj precipe ĉar la kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue. Tial gravas, ke ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn, kiun la Kongresa Fako rezervos, se ne eblas plenumi la originan mendon. El la reta mendilo eblas scii, kiuj loĝejoj ankoraŭ havas liberajn lokojn.

### Ekskursoj

Ĉiuj ekskursoj startas de la kongresejo, krom se alie indikite (ĉu en la ekskursa priskribo, ĉu sur la ekskursa bileto). Bonvolu veni 15 minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiujn ekskursojn akompanos Esperantlingvaj gvidantoj.

Kun la kongresaj dokumentoj ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la biletoj de la menditaj ekskursoj kun la bazaj informoj pri ili (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj, presitaj en la Dua Bulteno. Kaze de malsameco validas la informoj presitaj sur la biletoj.

Ne forgesu preni ŝirmilon kontraŭ suno, vento kaj eventuale pluvo aŭ malvarmo. Bv. noti, ke kelkaj ekskursoj povas esti netaŭgaj por homoj kun marŝproblemoj; la priskribo de la ekskurso kutime mencias tion.

### Ekskursaj kondiĉoj

Ĉar la ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizantoj rezervas al si la rajton eventuale nuligi ilin aŭ altigi la prezojn de iuj el ili. En tiuj kazoj ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso, por ke eblu ŝanĝi aŭ nuligi la ekskurso(j)n.

### Limdatoj

La limdato por mendi antaŭ- kaj post-kongresajn ekskursojn estas la 30-a de aprilo 2025. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte kaj nepre kontraŭ krompago de 100 €. La limdato por mendi loĝadon estas la 31-a de majo. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte kaj kontraŭ krompago de 40 €.

La ceterajn ekskursojn kaj la bankedon eblos mendi ĝis la elĉerpiĝo de liberaj lokoj.

### Pago kaj konfirmo de mendoj

La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago. Post la trakto la kongresano ricevas la konfirman mesaĝon de la Kongresa Fako.

Kiel daton de la mendoricevo oni konsideras la daton de la ricevo de la pago. Se la mendo ne estas plene pagita, bv. tuj pagi la diferencon. Se la ŝuldo estas malpli ol 20€, oni povas pagi ĝin dum la UK.

### Malmendoj

Malmendoj devas esti skribaj (al *kongresoj@co.uea.org* aŭ per redakto de la reta mendilo). Ĉe malmendoj faritaj antaŭ la 1-a de majo oni rericevos la tutan mendosumon, minus 30 € por la administraj kostoj. Ekde la 1-a de majo ne eblas ricevi repagon.

### Transdono de mendoj

Eblas transdoni pagitan mendon al alia kongresano ĝis la 1-a de julio 2025. Por tio bezonatas skribi al *kongresoj@co.uea.org* kaj indiki, kiun mendon kaj al kiu oni transdonas. Post la trakto de la peto ambaŭ personoj ricevos novajn konfirmajn mesaĝojn kun la listo de menditaj servoj.

### Reklamacioj kaj repagoj

Ĉiuj reklamacioj kaj postuloj pri repagoj (ekz. pro neliveritaj aŭ neuzitaj servoj, nepartopreno k.s.) devas esti faritaj skribe al *kongresoj@co.uea.org* kun

la titolo "Reklamacio" antaŭ la fino de aŭgusto 2025. Se eblas, la reklamacion oni faru jam dum la UK.

Atente traleginte la priskribojn bv. elekti la servon kaj plenigi la retan mendilon.

**KIEL MENDI?**

Ĉiu kongresano ricevas al sia retpoŝtkesto personan ligilon por la reta mendilo.

Uzante ĝin, eblas ankaŭ ŝanĝi sian mendon poste.

Ne hezitu kontakti la Kongresan Fakon per *kongresoj@co.uea.org* kaze de ajnaj demandoj.



# Hoteloj

Ĉiuj prezoj estas en eŭroj (€) por unu persono por unu nokto; p.p. = por persono.

UEA sukcesis interkonsenti tre favorajn prezojn, ni invitas vin mendi vian ĉambron kiel eble plej frue por garantii komfortan restadon je favora prezo dum la kongreso.

### H1 Hotel Cosmopolitan Bobycentrum****

*Sportovní 559/2A*

**0,8 km** **11 min.**

Tiu ĉi luksa hotelo situas proksime de la kongresejo en la sama konstruaĵo, kie troviĝas la salono Zamenhof. Ĝi proponas vastajn klimatizitajn ĉambrojn kun privataj banĉambroj. La prezo inkluzivas riĉan matenmanĝon kaj aliron al la granda, bone ekipita sporta ekzercejo. Kontraŭpage disponeblas ripoziga areo kun negranda naĝejo. Apud la hotelo troviĝas senpaga publika parkejo, kelkaj restoracioj kaj kafejoj.

**Ĉambroj "Economy":** troviĝas sur la malsupraj etaĝoj kaj enhavas televidilon, fridujeton, retkonekton, sekurŝranketon, harsekigilon, ŝampuon, duŝgelon.
**Ĉambroj "Standard":** pli luksaj, troviĝas sur la mezaj etaĝoj, la prezo inkluzivas ĉion de "Economy" kaj aldone akvoboligilon, teon kaj kafon.
**Ĉambroj "Executive":** plej luksaj, troviĝas sur la supraj etaĝoj, la prezo inkluzivas ĉion de "Standard" kaj aldone pli luksajn kosmetikaĵojn kaj aliron al la ripoziga salono en la 9-a etaĝo (15h00 ĝis 22h00).

Ni rekomendas tiun ĉi hotelon al kongresanoj, kiuj ŝatus loĝi en luksa hotelo kaj komforte reveni al sia ĉambro post la fino de vespera programo en la salono Zamenhof.

- "Economy"
  - Unupersona ĉambro: 94 €
  - Dupersona ĉambro kun 1 dupersona lito: 48 € p.p.
  - Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 48 € p.p.
- "Standard"
  - Unupersona ĉambro: 106 €
  - Dupersona ĉambro kun 1 dupersona lito: 55 € p.p.
  - Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 55 € p.p.
  - Tripersona ĉambro kun 1 dupersona lito kaj 1 unupersona: 55 € p.p.

- "Executive"
    - Unupersona ĉambro: 130 €
    - Dupersona ĉambro kun 1 dupersona lito: 70 € p.p.
    - Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 70 € p.p.











## **H2 Continental******

*Kounicova 680/6*

**1,6 km** **23 min.** **17 min.**

Tiu ĉi luksa hotelo troviĝas en trankvila parto de la urbocentro. La prezo inkluzivas bufedan matenmanĝon kaj aliron al la sporta ekzercejo. La hotelo havas privatan kontraŭpagan parkejon. Ĉiuj unupersonaj ĉambroj havas balkonon.

**Ĉambroj "Standard"**: troviĝas sur la malsupraj etaĝoj, komfortaj ĉambroj kun privataj banĉambroj kaj klimatizilo, retkonekto, televidilo, fridujeto, sekurŝranketo.

**Ĉambroj "Superior"**: troviĝas sur la supraj etaĝoj, la prezo inkluzivas ĉion de "Standard" kaj aldone teon, kafon (kapsulan kafmaŝinon) kaj banmantelon.

Ni rekomendas tiun ĉi hotelon al kongresanoj, kiuj ŝatus loĝi proskime al la urbocentro kaj vidindaĵoj de Brno.

- "Standard"
  - Unupersona ĉambro: 89 €
  - Dupersona ĉambro kun 1 dupersona lito: 52 € p.p.
  - Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 52 € p.p.
- "Superior"
  - Unupersona ĉambro: 105 €
  - Dupersona ĉambro kun 1 dupersona lito: 60 € p.p.
  - Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 60 € p.p.







## H3 International****

*Husova 16*

2,5 km 35 min. 18 min.

Tiu ĉi hotelo troviĝas en la urbocentro. Luksaj vastaj ĉambroj havas privatan banĉambron, klimatizilon, retkonekton, televidilon, fridujeton, sekurŝranketon, akvoboligilon, teon kaj kafon. La prezo inkluzivas matenmanĝon kaj aliron al la sporta ekzercejo. La hotelo havas privatan kontraŭpagan parkejon.

Ni rekomendas tiun ĉi hotelon al kongresanoj, kiuj ŝatus loĝi en la urbocentro de Brno tuj sub la kastelo *Špilberk* kaj granda parko.

- Unupersona ĉambro: 120 €
- Dupersona ĉambro kun 1 dupersona lito: 70 € p.p.
- Dupersona ĉambro kun 2 apartaj litoj: 70 € p.p.






## **H4-H5** Mendelu JAK – studenthejmo J. A. Komenského

*Kohoutova 3-11*

1,5 km | 20 min. | 10 min.
















Tiu ĉi universitata studenthejmo proponas neklimatizitajn ĉambrojn kun apartaj unupersonaj neetaĝaj litoj. En ambaŭ konstruaĵoj estas liftoj. La prezo inkluzivas litotolaĵon, malgrandan viŝtukon kaj sapon. Ne estas matenmanĝo.

La studenthejmo estas bone atingebla per la buso 46, kiu haltas ĉe la bushaltejo *Erbenova* tuj apud la kongresejo. Estas negranda privata senpaga parkejo, sed ne eblas rezervi lokon. En apudaj stratoj troviĝas publikaj pagendaj parklokoj.

Loĝado ĉi tie mendeblas por minumime 6 noktoj. Eblas mendi 3 aldonajn noktojn antaŭ la UK kaj 2 poste.

**H4** En la konstruaĵo "B" troviĝas unu- kaj dulitaj ĉambroj, ĉiuj du ĉambroj kundividas banĉambron kaj kuirangulon (kun fridujo, sed sen potoj aŭ manĝilaro). En la konstruaĵo estas vifio, sed oni ne povas garantii fortan signalon en la ĉambroj.

**H5** En la konstruaĵo "C" troviĝas apartaj unu- kaj dulitaj ĉambroj sen vifio, ekster la ĉambroj situas komunaj banĉambroj kaj kuirejetoj (kun fridujo, sed sen potoj aŭ manĝilaro).

Ni rekomendas tiun ĉi studenthejmon al junuloj kaj ĉiuj, al kiuj taŭgas neluksa sed komforta kaj favorpreza loĝado kun rekta busa konekto al la kongresejo.

- H4 – konstruaĵo "B"
    - Unupersona ĉambro: 40 €
    - Loko en dupersona ĉambro: 20 € p. p.
- H5 – konstruaĵo "C"
    - Unupersona ĉambro: 30 €
    - Loko en dupersona ĉambro: 15 € p. p.



# Ekskursoj

Se la sinsekvo de la vizitindaĵoj dum la ekskursoj ne povos okazi laŭ la priskribo, estos proponataj alternativoj. Pri la eventuala nuligo de programero(j) pro kialoj ekster la homa rego UEA ne respondecas. La partoprenantoj devas memstare atingi la lokojn de la komenco de la antaŭkongresa ekskurso kaj memstare vojaĝi al la (flug)haveno por foriri hejmen, fine de la postkongresa ekskurso.

Ĉiu partoprenanto respondecas pri la informo al UEA de siaj nomoj kiel enskribitaj en la pasporto (oni povas esti rifuzita en la ekskursoj se la nomo sur la mendolisto ne kongruas kun tiu en la pasporto).

## Antaŭkongresa ekskurso

### A1 Prago

**Vizitu unu el la plej belaj urboj de Eŭropo – Pragon, la ĉefurbon de Ĉeĥio!**

*23-a ĝis la 26-a de julio (4 tagoj, 3 noktoj)*

**La prezo inkluzivas:**

- 3 x tranokton en 4* hotelo *DUO* kun matenmanĝoj kaj vespermanĝoj;
- ekskursojn en Prago kun profesia ĉiĉerono (inkluzive de enirpagoj) laŭ programo;
- 2 x tagmanĝon en la historia centro de Prago;
- 3 x bustransporton al/de la centro de Prago al la hotelo – laŭ la programo;
- 1 x transporton de la centro de Prago al la hotelo per publika transporto, laŭ la programo, metrobileto;
- viziton de fama bierfarejo *U Fleků* kun biergustumado;
- bustransporton de *DUO*-Hotelo al Brno;
- tagmanĝon en Brno.

**La prezo ne inkluzivas:**

- personajn elspezojn, hotelajn ekstraĵojn (ekz. trinkaĵojn en la hotelĉambraj fridujetoj aŭ pliajn servojn en hoteloj);
- aliajn individue elekteblajn enirbiletojn ekster la programo;
- flughavenan transporton;
- personan san- kaj/aŭ vojaĝ-asekuron.

## PROGRAMO

### 23.07

Alveno al la hotelo (Hotelo DUO****, Teplická 492, Prago) ekde la 15-a horo. Vespermanĝo en la hotelo kaj tranokto.

### 24.07

Matenmanĝo en la hotelo. Vojaĝo per buso al Praga Kastelo (*Pražský Hrad*). Kun ĉiĉerono ni vizitos la majestan Reĝan Palacon (*Královský palác*) kaj Katedralon de Sankta Vito (*Chrám svatého Víta*), unu el la plej malnovaj preĝejoj en la urbo. Ni ankaŭ vizitos la Oran Straton (*Zlatá ulička*), mallarĝan strateton kiu trairas la koron de la palaco kaj estas fama pro siaj butikoj kaj restoracioj. Fine ni vizitos la Bazilikon de Sankta Georgo (*Bazilika svatého Jiří*), unu el la plej gravaj preĝejoj de la urbo. Poste ni vizitos la Malgrandan Urbon (*Malá Strana*).

Esplorinte la kastelon, ni iros al la Malgranda Urbo, historia kvartalo karakterizita de siaj pavimitaj stratoj kaj buntaj domoj. Ni promenos tra ĝiaj stratoj kaj malkovros la arkitekturon kaj historion de ĉi tiu ĉarma kvartalo.

Post tagmanĝo ni daŭrigos la ekskurson kaj vizitos i.a. la faman insulon Kampa, kiu prezentas mirindajn vidojn de la urbo, Ponton de Karolo (*Karlův most*) kaj Malnovan Urboplacon (*Staroměstské náměstí*). Fine, ni vizitos la Astronomian Horloĝon (*Orloj*), kiu estas unu el la plej malnovaj en la mondo kaj situas en la koro de la urbo. Ni ankaŭ esploros la Parizan Straton (*Pařížská ulice*), unu el la plej ikonecaj stratoj de la urbo, kiu estas konata pro siaj luksaj butikoj kaj restoracioj. Ni finos la tagon per bufeda vespermanĝo en la hotelo.



**25.07**

Matenmanĝo en la hotelo. Ni komencos en la koro de la urbo, Malnova Urbo (*Staré Město*), kie ni promenos laŭ ĝiaj pavimitaj stratoj kaj admiros la gotikan kaj renesancan arkitekturon.

Nia unua celloko estos Juda Urbo, historia kvartalo kiu enhavas kelkajn el la plej gravaj sinagogoj en la urbo, kiel la Malnov-Nova, la Hispana, la *Pinkasova* kaj la *Maislova*. Esplorinte la Judan Urbon, ni iros al la Malnova Urbo, kie ni promenos tra ĝiaj mallarĝaj stratoj kaj admiros la mezepokan arkitekturon. Post la tagmanĝo ni vizitos la bierfarejon *U Fleků*, kie ni povos gustumi tri lokajn bierspecojn.  Fine ni havos iom da libera tempo en la urbocentro por aĉeti suvenirojn aŭ ĝui trankvile la belecon de Prago. Ni finos la tagon per bufeda vespermanĝo en la hotelo.



**26.07**

Matenmanĝo en la hotelo kaj forveturo per la turisma buso al Brno. Tagmanĝo en Brno.

Dum tiu ĉi ekskurso vi povos vidi la plej belajn lokojn de Prago, ĝui la unikan gastronomion kaj sperti la riĉan kulturon de unu el la plej belaj urboj de Eŭropo!

**Prezo:**

– en unupersona ĉambro: 810 €;
– en dupersona ĉambro: 640 € p.p.

# Postkongresa ekskurso

## P1 Znojmo – Bratislavo – Vieno

*2-a ĝis la 6-a de aŭgusto (5 tagoj, 4 noktoj)*

Ĉi tiu ekskurso komenciĝos en Brno post la fino de la Universala Kongreso de Esperanto – sabaton, la 2-an de aŭgusto 2025. La ekskurso finiĝos la 6-an de aŭgusto 2025 en Vieno, do estas necese plani vian revenon el Vieno.

**La prezo de la ekskurso inkluzivas:**

- 4 tranoktojn en komfortaj 4-stelaj hoteloj kun matenmanĝoj kaj vespermanĝoj;
- tri-pladajn tagmanĝojn en historiaj urbocentroj, kie vi gustumos lokajn specialaĵojn;
- transporton per komforta turisma buso kaj loka transporto (inkluzive de metroo en Vieno);
- enirbiletojn al elektitaj vidindaĵoj: Slava Epopeo de Alfons Mucha en Moravský Krumlov, Loucký-Monaĥejo en Znojmo, la kastelo Schönbrunn en Vieno;
- gvidatan vin-gustumadon en Suda Moravio;
- servojn de esperantista gvidisto dum la tuta ekskurso;
- lokajn turismajn kotizojn.

**La prezo ne inkluzivas:**

- personajn elspezojn, ekz. hotelajn ekstraĵojn (ekz. trinkaĵojn en la hotelĉambra fridujetoj aŭ pliajn servojn en hoteloj);
- aliajn individue elekteblajn enirbiletojn ekster la programo;
- flughavenan transporton;
- personan san- kaj/aŭ vojaĝ-asekuron.

### PROGRAMO

#### 02.08: Brno – Znojmo

Forveturo el Brno posttagmeze kaj vizito al la ikoneca artverko de Alfons Mucha – Slava Epopeo en Moravský Krumlov. La vespero inkluzivas loĝadon en la hotelo Vinice Hnanice, kie vi ĝuos vespermanĝon kaj gvidatan gustumadon de elstaraj moraviaj vinoj.

#### 03.08: Znojmo – Bratislavo

Post matena vizito de la pitoreska Znojmo kaj tagmanĝo en bierfareja restoracio, vi vizitos Loucký-Monaĥejon kun plia vingustumado. Vespere vi alvenos en Bratislavon, loĝos en la luksa hotelo Park Inn Danube, kaj ĝuos vespermanĝon en la hotelo.

### 04.08: Bratislavo – Vieno

Vizito de Bratislavo, piedira promeno tra la urbo kun komforta trajnetveturo al la Bratislava kastelo, akompanata de aŭdio-gvidilo en Esperanto. Post tagmanĝo en la urbocentro, vi veturos al Vieno, kie vi loĝos en la Parkhotel Schönbrunn, iama imperiestra loĝejo por gravaj gastoj. La vespero estos libera por ripozo aŭ por vizito al la famaj ĝardenoj de Schönbrunn.



### 05.08: Schönbrunn kaj la urbocentro de Vieno

Matene vi ĝuos viziton de la internaj salonoj kaj la mirindaj ĝardenoj de la kastelo Schönbrunn. Poste sekvos tagmanĝo apud la Viena Operejo kaj vizito al la urbocentro, inkluzive de libera tempo por butikumado aŭ muzeovizitoj.



**06.08: Individua programo en Vieno**

La programo finiĝas per matenmanĝo en la hotelo. Vi povas pasigi la lastajn horojn en Vieno laŭ via elekto (ekz. per vizito de la loka Esperanto-muzeo).



**Spertu Mez-Eŭropon plene!**

Ĉi tiu ekskurso proponas unikan kombinaĵon de kulturaj spertoj, historio kaj komforto. Vi vizitos ikonecajn lokojn en tri landoj – Ĉeĥio, Slovakio kaj Aŭstrio – kaj ĝuos altkvalitajn servojn, delikatan gastronomion, kaj la unikan etoson de ĉi tiu parto de Eŭropo.

**Kial vi nepre ne maltrafu ĉi tiun ekskurson?**

- vi vidos la ikonecan artverkon de Alfons Mucha – Slava Epopeo;
- vi malkovros unikajn historiajn urbojn kiel Znojmo, Bratislavo kaj Vieno;
- vi ĝuos gvidatan gustumadon de bonegaj moraviaj vinoj;
- vi vizitos tri landojn dum unu ekskurso – Ĉeĥio, Slovakio kaj Aŭstrio;
- loĝado en zorge elektitaj 4-stelaj hoteloj garantios maksimuman komforton;
- vi ĝuos kulinarajn specialaĵojn kiel tagmanĝo apud la Viena Operejo kaj vespermanĝoj en historiaj urbocentroj;
- profesiaj gvidistoj malkaŝos al vi la sekretojn de ĉiu vizitata urbo.

**Aliĝu al ni en ĉi tiu neforgesebla vojaĝo kaj malkovru la tutan belecon kaj diversecon de Mez-Eŭropo!**

**Prezo:**

– en unupersona ĉambro 1380 €
– en dupersona ĉambro po 1190 € p.p.

# Ekskursoj dum la kongresa semajno

## Tuttagaj ekskursoj

**Ĉiuj tuttagaj ekskursoj inkluzivas:**

- vojaĝon per turisma bus(et)o;
- tuttagan gvidanton en la ĉeĥa kaj akompananton/tradukanton en Esperanto;
- tagmanĝon.

### E1 Kastelo Lednice

Kastelo kaj boata vojaĝo al la Minareto

***merkrede, ĵaŭde 8h45-18h00***

La kastelo *Lednice* estas parto de la *Lednicko-Valtický areál* (Areo Lednice – Valtice), ĝi estas fama vidindaĵo de Ĉeĥio. Tiu ĉi areo estas enskribita en la listo de Monda Heredaĵo de UNESKO. Origine tie estis gotika fortikaĵo, kiu estis transformita en renesancan kastelon kaj poste en la 19-a jarcento en novgotikan stilon. La kastelo estis somera loĝejo de la familio *Lichtenstein*, kaj ĝia arkitekturo estas karakterizita de riĉaj dekoracioj kaj romantikaj elementoj. En la areo de la kastelo troviĝas vastaj ĝardenoj, vitrejo kaj artefaritaj konstruaĵoj, kiel la Minareto kaj la Kasteleto de Jan. La interno de la kastelo *Lednice* enhavas valorajn kolektojn de arto, mebloj kaj historiaj objektoj.

Dum la ekskurso ni veturos per boateto al la Minareto. Ĝi estas unu el la plej signifaj konstruaĵoj en ĉi tiu regiono, konstruita en la jaro 1797. La navigado komenciĝas sur la Kastela lago kaj sekvas tra belaj akvaj vojoj al la Minareto. La vojaĝo en boateto daŭras ĉirkaŭ 20 minutojn, kaj dum ĝi vi povas ĝui la belecon de la ĉirkaŭa naturo. Ĉe la Minareto troviĝas malgranda haveno, de kie vi povas ekskursi al la konstruaĵo mem. La Minareto altas 60 metrojn kaj proponas belvidon al la tuta ĉirkaŭaĵo – post supreniro de 302 ŝtupoj. La tuta sperto kombinas belan naturon, historion kaj arkitekturon, kio faras ĉi tiun aktivecon neforgesebla sperto.

**Prezo: 98 €**



## **E2 Valtice**

Kastelo kaj vinkelo de Chateau Valtice

***marde, merkrede 8h45-18h00***

La kastelo *Valtice* situas en suda Moravio kaj estas unu el la plej gravaj barokaj kasteloj en Ĉeĥio. Ĝi apartenis al la princa familio de *Lichtenštejn*, kiu posedis ĝin dum pluraj jarcentoj. Origine, sur la loko de la kastelo staris mezepoka fortikaĵo, kiu estis rekonstruita al renesanca kastelo kaj poste transformita barokstile en la 17-a jarcento. La kastelo estas parto de la *Lednicko-Valtický areál* (Areo Lednice-Valtice). Tiu ĉi areo estas enlistigita en la Monda Heredaĵo de UNESKO. Ĝiaj internaj spacoj estas riĉe ornamitaj, kun imponaj salonoj kaj freskoj, kiuj reflektas la barokan stilon. Ene oni montras la vivon de la nobelaro. La kastelo estas ĉirkaŭita de vasta parko. Krom sia historia graveco, ĝi allogas vizitantojn per sia pitoreska pejzaĝo kaj unika atmosfero.



La vinkeloj de *Chateau Valtice* en la kampuso de la vinfabriko estas unu el la plej signifaj historiaj vinkeloj en Ĉeĥio. Al la plej konataj apartenas la Kruca vinkelo, kiu havas unikan krucan formon kaj estis konstruita en la 17-a jarcento. La vinkeloj havas longan tradicion, kiu komenciĝis jam en la epoko de *Lichtenštejn*, kiuj jam kultivis ĉi tie vinberojn. Dum la ekskurso oni povas admiri la ŝtonajn muregojn kaj la tradiciajn lignajn barelojn.



La ĉiĉerono prezentos la historion de la vinproduktejo kaj ĝian signifon en la regiono. Poste sekvos vizito de la Kruca kelo, kie la vizitantoj ekscios ion pri la arkitekturo kaj pri tio, kiel la vinoj maturiĝas. Vi vizitos la Templon de l'vino kun rotondo, kiu estas reprezenta spaco por gustumado.

En la kadro de la ekskurso vi gustumos diversajn specojn de vinoj el la produktado de *Chateau Valtice* **(5 specoj).** Vi konatiĝos kun la procezo de vino-farado kaj kun individuaj vinberaj specoj. Post la vizito estos eblo aĉeti vinojn rekte surloke.

**Prezo: 84 €**

## E3 Moravia karsto

La Punkva-kaverno, boatado kaj abismo *Macocha*

***sabate, lunde, merkrede 9h15-17h00***

La Punkva-kaverno (*Punkevní jeskyně*) situas en la Moravia karsto (*Moravský kras*). Ĝi estas unu el la plej vizitataj kavernoj en nia lando. Ĝia formado komenciĝis antaŭ pli ol 1,5 milionoj da jaroj, kiam erozio kreis fascinan subteran strukturon. En la kaverno estas imponaj stalaktitoj, stalagmitoj kaj stalagnatoj, kiuj formas mirindajn naturajn formaciojn.

Unu el ĝiaj plej interesaj trajtoj estas la subtera rivero *Punkva*, kiu trapasas ĝiajn spacojn kaj vi povos sperti unikan vojaĝon en boateto. La tuta longo de la kavernaj koridoroj atingas proksimume 1,5 kilometrojn, el kiuj parto estas alirebla por la publiko. La kaverno ankaŭ havas signifan historian valoron; ĝi estis konata jam en la 19-a jarcento, kiam ĝi estis esplorata kaj malfermita al vizitantoj.

Dum la vizito vi povos ekscii pri la geologiaj procezoj, kiuj kondukis al ĝia formado, kaj pri la riĉaj faŭno kaj flaŭro, kiuj troviĝas en la kaverno. Ĝi estas ankaŭ la hejmo de kelkaj raraj specioj de vespertoj, kiuj nestas ĉi tie. Pro la lumigo kaj bone planita sistemo de vizitoj la *Punkva*- kaverno estas unika loko por ŝatantoj de naturo kaj historio. Ĝi altiras vizitantojn el la tuta mondo.

Vi certe ĝuos belan naturon dum la pieda promenado, boatado en la kaverno kaj ankaŭ dum la vojo per telfero.

La abismo *Macocha* estas la plej profunda abismo en Ĉeĥa Respubli-



ko kaj ankaŭ en la Meza Eŭropo kaj situas en la Moravia Karsto (*Moravský kras*). Ĝia profundeco atingas ĝis 138 metrojn, la longeco estas proksimume 174 metroj kaj la larĝeco estas 76 metroj. La abismon formis erozia aktiveco kaj ĝi estas unu el la plej konataj naturaj formacioj en tiu regiono. La vizitantoj povas admiri ĝiajn imponajn murojn kaj la belvidojn de du observaj platformoj. *Macocha* estas ankaŭ la hejmo por diversaj specioj de plantoj kaj bestoj, pro kio ĝi estas signifa loko por naturaj sciencoj kaj turismo.

**Prezo: 71 €**

## E4 Kroměříž

Kastelo kaj florĝardeno

***merkrede, vendrede 8h30-18h00***

La Kastelo *Kroměříž*, konata ankaŭ kiel la Arkidiakona Kastelo, situas en la urbo *Kroměříž* en Moravio. Ĝi estis konstruita en la 17-a jarcento kaj iĝis la somera sidejo por la arkiepiskopoj de *Olomouc*. La arkitektura aspekto de la kastelo estas tipa por la baroka stilo, kaj ĝia aŭtoreco estas atribuita al la arkitekto Giovanni Battista Alliprandi. La kastelo estas ĉirkaŭita de vasta angla ĝardeno kaj franca ĝardeno, kiuj estas partoj de ĝia areo kaj estas gravaj ekzemploj de ĝardena arkitekturo.

En 1998 la kastelo estis enskribita en la liston de mondaj heredaĵoj de Unesko, kio emfazas ĝiajn historion kaj kulturon. La internoj de la kastelo enhavas valorajn artaĵojn, inkluzive pentraĵojn, skulptaĵojn kaj historian meblaron. Inter la plej gravaj partoj de la kastelo troviĝas la reprezenta Salono de Antaŭuloj kaj la Spegula salono.

*Květná zahrada* – Florĝardeno – ĝardeno en la urbo *Kroměříž*, estas unu el la plej gravaj barokaj ĝardenoj en





Ĉeĥio. Ĝi estis fondita en la 17-a jarcento kaj servas kiel parto de la arkidiakona sidejo. La ĝardeno estas konata pro sia unika aranĝo, kiu kombinas francan kaj italan stilojn. En ĝia centra parto troviĝas grandaj floraj parteroj, kiuj estas ornamitaj per geometriaj ŝablonoj.

La dominanto de la ĝardeno estas pavilono kaj ankaŭ lago, kiu pliigas la belecon de ĉi tiu loko. La ĝardeno havas ankaŭ vitrejon, konstruitan en la 19-a jarcento, kiu servas por kultivi valorajn tropikajn kaj subtropikajn plantojn, inkluzive orkideojn kaj palmojn. La vitrejo estas arkitekture interesega pro sia neorenesanca konstruaĵo.

La ĝardeno estis enskribita en la liston de mondaj heredaĵoj de Unesko en 1998, kio konfirmas ĝiajn historian kaj kulturan signifojn. La ĝardeno estas ankaŭ hejmo de multaj valoraj plantoj kaj arboj, kiuj estis zorgeme elektitaj kaj plantitaj. La vizitantoj povas ankaŭ esplori vastajn aleojn kaj ĝui panoramajn vidojn sur la ĉirkaŭan pejzaĝon.

**Prezo: 64 €**

## **E5** Velehrad + Modrá

Baziliko kaj subĉiela muzeo

***ĵaŭde 8h15-18h00***



La arkeologia subĉiela muzeo *Modrá* troviĝas en la vilaĝo *Modrá* proksime de *Uherské Hradiště* en Moravio. Ĝi prezentas la vivon de niaj antaŭuloj el la epoko de Granda Moravio. La ekspozicio inkluzivas replikojn de grandmoraviaj konstruaĵoj, kiel ekzemple preĝejoj, laborejoj kaj loĝejoj.

Oni povas viziti ankaŭ la preĝejon de sankta Johano, kiu estas unu el la ĉefaj allogaĵoj de la muzeo. Sub la preĝejo troviĝas trezorejo, kiu konservas historiajn artefaktojn kaj objektojn el la periodo de Granda Moravio. Apud la muzeo troviĝas la Centro de Moraviaj-Slovakiaj Tradicioj, kiu fokusas konservadon kaj prezentadon de regionaj kutimoj kaj folkloro. La vizitantoj ankaŭ havas la eblon gustumi lokajn distilaĵojn (ni gustumos 3 specojn), kiuj estas parto de la Moraviaj-Slovakiaj kulturo kaj tradicioj.

La subĉiela muzeo celas reviviĝi la tradiciojn kaj kutimojn de niaj antaŭuloj.

La komplekso *Velehrad* situas en la pitoreska pejzaĝo de la regiono *„Slovácko"*, kaj estas konsiderata unu el la plej signifaj spiritecaj kaj historiaj lokoj en Ĉeĥa Respubliko. Ĝia historio devenas de la 9-a jarcento, kiam estis fondita grava monaĥa centro ligita kun la disvastigo de kristanismo en Granda Moravio, precipe dank' al la agado de sanktaj Cirilo kaj Metodo.

La komplekso *Velehrad* estas konata pro siaj pilgrimaj eventoj, kiuj okazas ĉefe dum la somero. Ĉi tiuj pilgrimadoj altiras milojn da kredantoj, kiuj kunvenas por preĝi, mediti kaj spirite regeneriĝi. En la kadro de ĉi tiuj eventoj ofte okazas sanktaj mesoj, prelegoj kaj aliaj kulturaj programoj.

La ĉefaj monumentoj de la komplekso:

La Baziliko de la Ĉieliro de la Virgulino Maria kaj sanktaj Cirilo kaj Metodo estas impona barok-baziliko, konstruita inter 1885 kaj 1889. Ĝi estas la dominanto de la komplekso. Ĝia arkitekturo estas karakterizita de monumentaj proporcioj, stukaj ornamaĵoj kaj valoraj pentraĵoj. En la interno troviĝas multaj signifaj artaĵoj, altaroj kaj statuoj, kiuj reflektas la religiajn kaj kulturajn tradiciojn de la regiono. Dum la vizitado de la Baziliko okazos orgena koncerto (ĉirkaŭ 20 minutoj).

Parto de la komplekso estas ankaŭ monaĥejo. Ĝia historio devenas de la tempo de sanktaj Cirilo kaj Metodo. Origine ĝi apartenis al benediktanoj, ĝi estis ofte renovigata kaj hodiaŭ ĝi servas kiel loko por spirita edukado kaj ripozo.

**Prezo: 92 €**



## **E6** Slavkov

Batalo de tri imperiestroj

***marde 9h00-18h00***

La Batalo de Tri Imperiestroj, konata ankaŭ kiel la Batalo ĉe *Slavkov*, (germane "*Austerlitz*"), okazis la 2-an de decembro 1805 kaj estas konsiderata unu el la plej gravaj militaj konfrontiĝoj en la historio. Ĉi tiu batalo, kiu okazis proksime de la urbo *Slavkov* ĉe Brno, inkluzivis la armeojn de Francio, Rusio kaj Aŭstrio. Napoleono Bonaparte gvidis la francan armeon, dum la rusaj kaj aŭstraj armeoj estis sub la gvidado de caro Aleksandro la 1-a kaj imperiestro Francisko la 2-a.

La batalo etendiĝis sur la areo ĉirkaŭ la monteto Žuráň, kiu havis strategian signifon por ambaŭ flankoj. Napoleono per elstara strategia manovrado devigis siajn kontraŭulojn fari erarojn. La franca armeo havis malpli da soldatoj, sed ili havis avantaĝon en pli bonaj organizado kaj taktiko. La batalo komenciĝis matene, kiam Napoleon ordonis la retiriĝon de siaj unuoj, logante tiel la kontraŭulojn en kaptilon.

Dum la ekskurso ni vizitos la kastelon Slavkov, kiu dum la batalo estis la sidejo de la aŭstra imperiestro Francisko la 2-a, la kastelo ludas gravan rolon en ĉi tiu historia evento. Post la batalo, okazis en Presburgo pacnegocadoj, kie estis subskribitaj novaj interkonsentoj. Slavkov fariĝis simbolo de la militista geniulo Napoleono, kaj hodiaŭ ĝi allogas turistojn, kiuj volas koni ĝian historian ĉarmon. Hodiaŭ en la regiono okazas ankaŭ memorceremonioj kaj prezentado de la batalo por konservi la memoron pri ĉi tiu grava evento en la eŭropa historio.

**Prezo: 62 €**



## E7 Svitavy

Muzeo de Esperanto kaj kastelo

*merkrede 8h30-18h00*



La Esperanta muzeo en la urbo *Svitavy* estas la sola muzeo de sia speco en Ĉeĥa Respubliko, fokusita al la lingvo Esperanto kaj ĝia kulturo. Ĝi situas en historia konstruaĵo de la municipa biblioteko, konstruita ĉe la fino de la 19-a kaj komenco de la 20-a jarcento, kiu elstaras pro neorenesancaj elementoj. La muzeo, fondita en 2007, prezentas al la vizitantoj vastan proponon de eksponaĵoj, inkluzive librojn, revuojn kaj historiajn dokumentojn rilatajn al Esperanto. La internejo estas adaptita por ekspoziciado de ĉi tiuj eksponaĵoj kaj ankaŭ servas kiel spaco por diversaj kulturaj eventoj kaj kunvenoj. Krom la konstanta ekspozicio, la muzeo organizas ekspoziciojn kaj seminariojn, kiuj celas promocii Esperanton kaj ĝian uzadon. Tiel ĝi celas konservi kaj evoluigi la Esperantan kulturon kaj konsciigon inter la publiko. La konstruaĵo de la muzeo, situanta en la centro de la urbo, estas facile alirebla por vizitantoj kaj kontribuas al la popolareco de Esperanto en la regiono. La muzeo ludas gravan rolon en la evoluo de la komunuma vivo kaj edukado pri la internacia lingvo. Entute, la Esperanta muzeo en *Svitavy* reprezentas signifan spacon por edukado kaj kultura interŝanĝo.



La Kastelo *Litomyšl* estas baroka monumento situanta en orienta Ĉeĥio en la urbo *Litomyšl*. Ĉi tiu kastelo estis konstruita inter 1540 kaj 1556, kaj ĝia arkitekturo kombinas elementojn de renesanco kaj baroko. En 1999 la kastelo estis enskribita en la liston de mondaj heredaĵoj de Unesko.

La kastelo estas ĉirkaŭita de bela angla ĝardeno, kiu logas vizitantojn por promenadoj kaj ripozo. La internoj de la kastelo estas riĉe ornamitaj kaj enhavas valorajn kolektojn de arto, meblaro kaj historiaj objektoj. Inter la plej gravaj partoj de la kastelo estas la Kavaleria halo, kiu estas konata pro siaj unikaj freskoj.

**Prezo: 56 €**

## **E8** Olomouc

Urba trarigardo

***merkrede 9h00-18h00***

*Olomouc* estas urbo plena de historiaj monumentoj kaj interesaĵoj, situanta en Meza Moravio, 80 kilometrojn de Brno. La urbo fieras pri sia riĉa historio, kiu videblas ĉe ĉiu paŝo.

En la Placo de la Respubliko leviĝas la impona kolono de la Sankta Triunuo, kiu estas enskribita en la Unesko-liston. En la koro de la urbo troviĝas bela urbodomo, kies horloĝo estas unika pro sia mekanika konstruo kaj ĉiutage allogas vizitantojn. La Katedralo de Sankta Venceslao estas la dominanta konstruaĵo de la urbo, kaj ĝia turo donas mirindan vidon al *Olomouc***.** Ĝi estas parto de la burgo.





En *Olomouc* oni trovos ankaŭ barokajn fontanojn kun unike belaj skulptaĵoj, kiuj ornamas la Supran Placon **(***Horní náměstí***).**

Grava estas la Fortikaĵo de *Olomouc***,** kiu estis konstruita en la 17-a kaj 18-a jarcentoj kiel defenda linio de la urbo kaj ludis ŝlosilan rolon en ĝia defendo. La Preĝejo de Sankta Maŭrico estas alia bela ekzemplo de gotika arkitekturo. En *Olomouc* troviĝas ankaŭ multaj pitoreskaj stratoj, kiuj invitas al promenado.

Proksime de la urbo troviĝas la kastelo sur la Sankta Monteto, de kie oni ĝuas belan panoramon de la tuta regiono.

**Prezo: 56 €**

## E9 Montaro *Pálava*

Montoj, arbaroj kaj kaverno

***merkrede 8h45-18h00***

*Pálava* apartenas al la plej belaj lokoj de Suda Moravio. Ĝi estis enloĝata de homoj jam antaŭ tridek mil jaroj. La dominanto de la regiono estas kalkoŝtonaj Montetoj de Pavlov (*Pavlovské vrchy*). Pro unika naturo la areo estas natura protektrezervejo. Dum la ekskurso ni trairos tri montetojn, vizitos ruinojn de du burgoj el la 13-a jarcento kaj unu groton. Ni marŝos 14 km tra arbaroj, stepoj kaj vinberejoj kaj ravino, ni entute supreniros 590 m kaj malsupreniros 500 m. La ekskurso ne taŭgas por homoj kun marŝproblemoj.





Partoprenantoj ricevos malvarman tagmanĝon en la buso komence de la ekskurso.

**Prezo: 44 €**



# Duontagaj ekskursoj

## D1 Urba rondiro

***sabate 13h30-17h00***
***dimanĉe 14h30-18h00***
***lunde 9h00-12h30***
***marde 14h30-18h00***
***ĵaŭde 9h00-12h30***



Estas perfekta por tiuj, kiuj volas esplori la ĉefajn monumentojn de historia centro de Brno. Dum la ekskurso oni povos vidi la diversajn partojn de la historia centro de urbo, por tiel ekkoni pli la historion kaj arkitekturon de la urbo.

**Prezo: 12 €**

## D2 Vilao Tugendhat

***marde, ĵaŭde, vendrede 9h30-12h00***



La vilao *Tugendhat*, konstruita inter 1928 kaj 1930, estas grava verko de moderna arkitekturo, projektita de la fama arkitekto Ludwig Mies van der Rohe. Ĝi situas en Brno kaj estas konata pro siaj novigaj konstruaj teknikoj kaj minimalisma dezajno. Ĝiaj havantoj estis la entreprenisto Fritz Tugendhat kaj lia edzino Grete, kiuj volis krei reprezentan familian domon. La internejo de la vilao konsistas el malfermitaj spacoj kaj grandaj fenestroj, kiuj ebligas maksimuman eniron de natura lumo, kreante harmonian interligon inter la interno kaj ekstero.

La aranĝo de la vilao estas unu el la ŝlosilaj aspektoj de ĝia arkitektura kaj historia graveco. Multaj mebloj estis projektitaj rekte de Mies van der Rohe, inkluzive la ikonajn seĝojn, kiel la Barcelona-seĝo. La materialoj, kiel

marmoro, ligno kaj vitro, donas al la spaco sentempan aspekton. La zonado de la spaco reflektas la funkciajn kaj sociajn aspektojn de la familia vivo; la loĝĉambro, manĝejo kaj laborspacoj estas aranĝitaj por ebligi glatan movadon kaj interagon.

Parto de la vilao estas ankaŭ la ĝardeno, kiun projektis la arkitekto Ferdinand Leffler. La ĝardeno provizas spacon por ripozo kaj estetikan valoron, tiel perfekte kompletigante la arkitekturan koncepton de la konstruaĵo. La ilumino estas minimalisma, por ne ĝeni la tutan atmosferon, dum teknikaj novaĵoj, kiel centra varmigado kaj elektra iluminado, faris la vilaon unu el la plej modernaj konstruaĵoj en Ĉeĥoslovakio.

En la jaro 2001 la vilao *Tugendhat* estis enskribita en la liston de mondaj heredaĵoj de Unesko, kio konfirmas ĝian kulturhistorian valoron. La origina ekipaĵo de la vilao, kiu estis en la Dua Mondmilito difektita, nun estas zorgeme restaŭrita kaj konservita, por ilustri la vivstilon de la familio *Tugendhat*.

Tiel, la vilao *Tugendhat* ne nur fariĝas arkitektura juvelo, sed ankaŭ dokumento pri la estetikaj, sociaj kaj teknologiaj ŝanĝoj en la intermilita Eŭropo.

**Prezo: 25 €**

## D3 Burgo Špilberk

***marde 9h00-12h30***
***ĵaŭde, vendrede 13h00-16h30***

La burgo *Špilberk* situas en la centro de la urbo Brno. Ĝi estis konstruita en la 13-a jarcento kiel reĝa fortikaĵo. Ĝia strategia loko sur la monteto *Špilberk* ebligis kontroli la ĉirkaŭan teritorion. En la 18-a jarcento la kastelo estis rekonstruita al baroka fortikaĵo. La kastelo ludis signifan rolon en la defendo de la urbo dum diversaj militoj. En 1783, la kastelo estis transformita en malliberejon por politikaj kaptitoj. Inter ĝiaj plej famaj kaptitoj estis la barono František Trenck. La malliberejo estis konata pro siaj malfacilaj kondiĉoj kaj kruela traktado. En la 19-a jarcento la malliberejo estis neniigita. Hodiaŭ *Špilberk* estas grava historia kaj kultura centro. Vizitantoj povas esplori la ekspoziciojn pri la historio de la kastelo kaj la urbo



Brno. De la kastelo estas bela vido al la urbo kaj la ĉirkaŭa pejzaĝo. La kastelo gastigas diversajn kulturajn eventojn kaj festivalojn. En la areo estas ankaŭ muzeo, kiu proksimigas la historion de Brno. La kastelo *Špilberk* estas nacia kultura heredaĵo. Ĝi estas unu el la plej vizitataj turismaj allogaĵoj en la regiono.

**Prezo: 18 €**

## D4 Akvorezervujoj Žlutý kopec

*dimanĉe, ĵaŭde 14h30-17h30*

Misteraj subteraj akvorezervujoj de la jaroj 1874, 1894 kaj 1917 estas en la listo de nepraj vidindaĵoj de Brno. Ili situas sub nerimarkebla herba areo de la revigligita parko sur *Žlutý kopec* kaj kreas etoson kvazaŭ el alia mondo, rememorigante pri longe formortintaj civilizacioj. Tri kolosaj subteraj rezervujoj estas unika arkitektura monumento kaj signo de escepta teknika industria arkitekturo en ĝia netuŝita formo. Tiu ĉi vidindaĵo malfermiĝis nur komence de 2024 kaj tuj iĝis furoraĵo inter la turistoj.

**Prezo: 20 €**



## D5 Botanika ĝardeno

*lunde, vendrede 9h00-11h30*

La Botanika Ĝardeno kaj Arbejo (*Botanická zahrada a arboretum*) estas edukejo de Mendel-Universitato en Brno. Ĝi fondiĝis en 1938 kaj nuntempe grandas je 11 hektaroj. La areo estas dividita en kvin temajn partojn. La sudaj deklivoj de la ĝardeno estas plantitaj kun pli rezistemaj plantoj el Mediteraneo kaj Kaŭkazo, kaj ankaŭ Nordameriko estas vaste reprezentita ĉi tie. Krom la ekzotikaj plantoj, vi vidos ankaŭ multajn specialajn kreskaĵojn de Suda Moravio. La supra parto de la ĝardeno estas vicigita per observterasoj kaj pergoloj kun grimpplantoj. En la malsupra parto de la ĝardeno estas kuracaj kaj utilaj plantoj, hejma flaŭro kaj koniferaj kultivovarioj. La kolektoj enhavas proksimume 4000 speciojn de orkideoj, 300 speciojn de tillandsioj, 2000 plurjarajn kreskaĵojn, 350 kultivovariojn de iridoj, 500 rokplantojn, kaj 4000 speciojn de lignecaj plantoj.

**Prezo: 8 €**



Foto: AVC MENDELU

## D6 Muzeo de Romaa Kulturo

*marde 9h30-12h00*

En Brno loĝas kaj laboras multenombra romaa komunumo. D-rino Jana Horváthová jam pli ol 30 jarojn gvidas la Muzeon de Romaa Kulturo. De kie romaoj alvenis? Kiaj estis iliaj sortoj en la mezepoko, antaŭ la dua mondmilito, dum la okupado kaj socialismo? Kiel ili vivas en la nuntempa erao? Ĉu vi scias, ke romaa sango cirkulis en la vejnoj de la famaj aktoroj Charles Chaplin, Yul Brynner kaj aliaj personecoj? En la muzeo oni povas ekvidi daŭran ekspozicion „*Příběh Romů*“ („Historio de Romaoj“), multe da unikaj romaaĵoj kaj produktoj de tradiciaj romaaj metioj el la tuta Ĉeĥa Respubliko.



Enirbileto en Muzeo de Romaa Kulturo kun fragmento de la pentraĵo Cigana Familio. Aŭtorino: Míla Doleželová, foto: O. A. Fischer

**Prezo: 12 €**

## D7 Bierfabriko Starobrno

*lunde, marde 14h30-17h00*

Dum la ekskurso, partoprenantoj ekscios pri la historia evoluo de la bierfabriko, kiu havas siajn radikojn en la 13-a jarcento, kaj pri ĝia graveco en la ĉeĥa bierkulturo. Ĉi tiu evento estas destinita al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la produktada procezo de biero kaj volas koni modernajn kaj tradiciajn teknologiojn en la bierkulturo. Fakuloj detale prezentos la individuaĵojn de la produktada procezo, de la elekto de altkvalitaj ingrediencoj, kiel lupolo, hordeo kaj akvo, ĝis la fermentado kaj maturiĝo de la biero.



La programo inkluzivos viziton de la produktaj spacoj, inkluzive la bierĉambrojn kaj fermentadajn kuvegojn, kie vi havos la ŝancon vidi la vivan produktadon de biero. La ekskurso inkluzivas ankaŭ gustumadon de elektitaj bieroj, kie ni fokusos la guston kaj aromon de individuaj produktoj.

En la fino de la ekskurso vi havos la ŝancon aĉeti suvenirojn kaj bierojn rekte de la bierfabriko.

**Prezo: 12 €**

## D8 Stelobservejo

*merkrede 19h15-22h15*


Ĉu vi iam rigardis per teleskopo la kraterojn de la Luno, la ringojn de Saturno aŭ la ŝtormojn de Jupitero? Vi havos la ŝancon vidi ankaŭ buntajn binarajn stelojn, brilantajn stelajn amasojn, nebulozojn kaj eĉ forajn galaksiojn – ĉion per modernaj, aŭtomate gvidataj teleskopoj.

La vitra fasado kaj vasta teraso prezentas spektindajn panoramojn de Brno, tage kaj nokte. Promenoj tra la nokta ĉielo estas komentataj de spertaj gvidantoj, kaj ĉar la ĉielaj korpoj ŝanĝas sian pozicion, ĉiu observado estas unika.

La observado taŭgas por vizitantoj de ajna aĝo. En kazo de malbona vetero, estos alternativa programo kun montrado de la artefarita stela ĉielo en malgranda planetario.

Ne maltrafu tiun ĉi unikan vespernoktan programon en la stelobservejo de Brno, kiun gvidos fama astrofizikisto kaj esperantisto, Amri Wandel.

**Prezo: 20 €**



## D9 Arbarista Panteono

*marde 14h00-18h00*

Esploru unikan regionon de arbaroj, akvoj kaj deklivoj norde de Brno. Ripozu de la brua urbo en silenta arbaro kaj faru promenon tra unikaj arbaroj. Nia promeno estos proksimume 8,5 kilometrojn longa. Fine de la ekskurso vi ĝuos agrablan panoramon al la tuta urbo. Dum la ekskurso vi povos trinki akvon el du akvofontujoj, tamen kunportu certe vian propran botelon kun akvo. Prenu ŝuojn taŭgajn por promeno tra naturo, parto de ekskurso gvidos tra roka tereno.

**Prezo: 10 €**



## **D10** ***Veveří* tra digolago**

*vendrede 9h00-14h00*



La ekskurso al la kastelo *Veveří* per ŝipo tra la Brno-digolago prezentas unikan kombinaĵon de natura kaj historia sperto. Ni ŝipveturos surface de la digolago, kiu estis konstruita en la jaroj 1936 - 1940 kiel akvorezervujo kaj refreŝiga areo. Dum la navigado ni havas la ŝancon admiri la pejzaĝojn ĉirkaŭ la lago, inkluzive de arbaraj deklivoj kaj pitoreskaj golfoj.

Post proksimume kvindekminuta navigado antaŭ ni aperos la kastelo *Veveří*, kies historio komenciĝas en la 13-a jarcento. La kastelo estis konstruita kiel gardokastelo ĉe komercaj vojoj, kaj dum sia ekzisto ĝi spertis multajn rekonstruadojn kaj modernigojn, kio alportis al ĝi diversajn arkitekturajn elementojn, inkluzive romanikajn, gotikajn, renesancajn kaj barokajn stilojn.

De la malgranda haveno la vizitantoj povas promeni tra la kastela areo, kie troviĝas historiaj konstruaĵoj, turoj kaj konservitaj partoj de la fortikaĵo. Inter la ĉefaj partoj de la burga ekspozicio estas la historio de la kastelo, mezepokaj armiloj kaj ekipaĵo, artaj kaj metiistaj ekspozicioj, kaj ekspozicioj pri la vivo en la kastelo.

La kastelo ankaŭ konservas historiajn dokumentojn kaj librojn, kiuj rilatas al ĝiaj historio kaj regiono. La kastelo *Veveří* prezentas regulajn trarigardojn, kiuj donas detalajn informojn pri la historio kaj arkitekturo de la kastelo. Oni ankaŭ aranĝas diversajn kulturajn eventojn, kiel historiaj rekonstruadoj, koncertoj kaj festivaloj, kiuj riĉigas la sperton de la vizitantoj kaj alproksimigas al ili la historion per la interaga formo.

En la kastela areo troviĝas ankaŭ belvida teraso, de kie oni vidas la Brno-digolagon kaj la belan pejzaĝon. Post la ekskurso oni povas ripozi en la loka restoracio, kiu ofertas tradiciajn ĉeĥajn pladojn. Tiu ĉi ekskurso do proponas ne nur edukajn aspektojn, sed ankaŭ naturajn belojn, kio faras ĝin alloga loko por turistoj.

Dum la ekskurso ne estas provizata manĝo. Vi povas kunporti manĝetojn aŭ laŭvole aĉeti ion en la loka rapidmanĝejo. Eblas plilongigi sian restadon ĉe la digolago kaj ankaŭ naĝi tie (en tiu kazo ne forgesu kunporti bankostumon kaj viŝtukon). Por atingi la digolagon ni uzos publikan transporton.

**Prezo: 33 €**

# Tabelo de dumkongresaj ekskursoj

**T = tuttaga ekskurso; M = duontaga ekskurso matene; P = duontaga ekskurso posttagmeze.**

| | Sab 26/07 | Dim 27/07 | Lun 28/07 | Mar 29/07 | Mer 30/07 | Ĵaŭ 31/07 | Ven 1/08 | **prezo, €** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| E1 - Lednice | | | | | T | T | | **98** |
| E2 - Valtice | | | | T | T | | | **84** |
| E3 - Moravia karsto | T | | T | | T | | | **71** |
| E4 - Kroměříž | | | | | T | | T | **64** |
| E5 - Velehrad + Modrá | | | | | | T | | **92** |
| E6 - Slavkov | | | | T | | | | **62** |
| E7 - Svitavy | | | | | T | | | **56** |
| E8 - Urbo Olomouc | | | | | T | | | **56** |
| E9 - Montaro Pálava | | | | | T | | | **44** |
| D1 - Urba rondiro | P | P | M | P | | M | | **12** |
| D2 - Vilao Tugendhat | | | | M | | M | M | **25** |
| D3 - Burgo Špilberk | | | | M | | P | P | **18** |
| D4 - Akvorezervujoj Žlutý kopec | | P | | | | P | | **20** |
| D5 - Botanika ĝardeno | | | M | | | | M | **8** |
| D6 - Muzeo de Romaa kulturo | | | | M | | | | **12** |
| D7 - Bierfabriko Starobrno | | | P | P | | | | **12** |
| D8 - Stelobservejo | | | | | V | | | **20** |
| D9 - Arbarista Panteono | | | | P | | | | **10** |
| D10 - Veveří tra digolago | | | | | | | M | **33** |

# Bankedo

**Prezo: 79€**

La ĉi-jara bankedo havos formon de bufedo – kie oni mem iros elekti kaj surtelerigi manĝojn laŭ sia prefero. La bufedo enhavos diversajn pladojn, kiuj taŭgos por viandmanĝantoj, vegetaranoj kaj veganoj. La prezo inkluzivas ankaŭ trinkaĵojn (kun- kaj senalkoholajn).

La bankedo okazos lunde, la 28-an de julio 2025, en la hotelo H1 Hotel Cosmopolitan Bobycentrum. Ĝi komenciĝos je la 19h00 kaj ni invitas vin veni 15 min. antaŭ la komenchoro.

## Menuo

### Bonvenigaj manĝetoj

### Salata bufedo

- Pluraj specioj de laktukoj, freŝaj legomoj, aldonaĵoj (balkana fromaĝo, mocarelo, maizo, kikeroj, olivoj ktp), vinagro, olivoleo

### Malvarma antaŭmanĝo

- Elekto de lokaj ĉeĥaj fromaĝoj kaj fumaĵitaj viandaĵoj
- Kampara fermentigita pano, ruĝa beto, ŝimfromaĝo, nuksoj
- Rostita bovaĵa rostbefo, ĥalapenjokapsikoj
- Humuso, krudaj legomoj (vegana)
- Avokada gvakamolo, tortilĉipsoj (vegana)

### Supo

- Karota krema supo kun kokosa lakto kaj kapsiketoj (vegana)

### Ĉefa plado

- Bakita kokaĵo kun la saŭco *Demi-glace* kaj kukurba pureo
- Kradrostita salmo kun rostitaj legomoj
- Vegetaraj lasanjoj de kukurbetoj, karotoj, melongenoj, cepoj, ĉampinjonoj, spicherboj, tomata saŭco, parmezano
- Piza pureo kun rostita kukurbo *Hokkaido*, rostitaj kukurbaj semoj kaj tempeo (vegana)

### Deserto

- Ĉokolada ŝaŭmaĵo kun framboj
- Miksita maskarpono kun kazeo kaj frukta saŭco
- *Panna cotta* el soja lakto kun frukta saŭco (vegana)
- Freŝaj fruktoj, frukta salato

### Trinkaĵoj

- Kafo, teo, akvo, senalkoholaj trinkaĵoj, biero kaj elekto de lokaj moraviaj vinoj

# Aranĝoj ĉirkaŭ la UK

## Esperantaj

**53-a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto (IIK)** en Brno, Ĉeĥio
26 julio - 2 aŭgusto, *iik.uea.org*

**81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)** en Cisarua, Indonezio
9-16 aŭgusto, *ijk2025.tejo.org*

**58-a Kongreso de ILEI** en Beogrado, Serbio
19-26 julio, kun busa karavano el Beogrado al Brno, *2025.kongreso.org*

**74-a KELI-Kongreso** en Poděbrady, Ĉeĥio
19-26 julio, *keli.chez.com*

**76-a IKUE-Kongreso** en Brno, Ĉeĥio
2-9 aŭgusto, *ikue.org*

**98-a Kongreso de SAT** en Greziljono, Francio
9-16 aŭgusto, *satesperanto.org*

**FESTO en Moissac**, Francio
17-24 aŭgusto, *festo.esperanto-jeunes.org*

## Neesperantaj

**Somera Ŝekspiro-Festivalo** en Brno, Prago kaj Ostrava, Ĉeĥio
*brno.shakespeare.cz*

**Planet Festival** en Brno, Ĉeĥio
7-13 julio, 4-10 aŭgusto, *festivalplanetbrno.cz*

**Pop Messe festival** en Brno, Ĉeĥio
24-26 julio, *popmesse.cz*

**Brasil Fest** en Brno, Ĉeĥio
31 julio - 3 aŭgusto, *brasilfestbrno.cz*

# Pliaj informoj

### Disdonado de reklamiloj kaj informiloj

UK estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri nova iniciato, speciala agado de via faka asocio, reklami novan eldonaĵon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, anonci renkontiĝon, kurson, varon ktp. Plej efike estas meti vian informilon en la dokumentujon, kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo kostas 275 € kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA (bv. kontakti la Kongresan fakon ĉe *kongresoj@co.uea.org*). Nenio rajtas esti distribuata kongreseje sen tiu permeso.

### Salonmendoj, standoj kaj budoj

Ĉiuj fakaj asocioj konataj de UEA ricevis mendilon pri salono por sia kunveno dum la UK. Salonmendoj devas atingi la Kongresan fakon ĝis la 30-a de aprilo 2025. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocio. Se via asocio ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso (*kongresoj@co.uea.org*).

Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj, kiuj volas aparte informi, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi standon aŭ lokon por instali sian budon dum la kongreso (400 €). La budon oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn.

### Kongresa Libroservo

Jen unika okazo aktualigi vian bibliotekon: en la Kongresa Libroservo multaj novaj libroj estos unuafoje lanĉitaj kaj plurajn titolojn eblos aĉeti kun speciala rabato. Ĝi havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK. Por vendigi viajn eldonaĵojn, necesas oferti ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume du monatojn antaŭ la kongreso.

### Pagmanieroj

Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun, kiu estas por vi la plej oportuna. La pagojn por mendoj faru rekte laŭ unu el jenaj manieroj:

**Via UEA-konto.** Vi povas plenigi vian UEA-konton per bankokarto pere de la sistemo Stripe (ne forgesu mencii vian UEA-kodon) *uzante tiun ĉi ligilon*.

**Banko.** Per ĝiro al unu el jenaj kontoj, je la nomo de Universala Esperanto-Asocio:

- Nederlando: ABN AMRO-Bank, IBAN: NL86 ABNA 0426 9014 44 (BIC: ABNANL2A);
- ING Bank, Postbus1800, NL-1000 BV Amsterdam (IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64, BIC/SWIFT: INGBNL2A).

Monsendojn al ĉi tiuj du kontoj bv. fari nepre en EUR. Eventualajn administrajn bankokostojn ĉiam pagas la mendanto.

**PayPal.** Eblas pagi pere de PayPal uzante la adreson financoj@co.uea.org. Bv. aldoni 5% al la pagata sumo pro administraj kostoj.

### Asekuro

La kongreskotizo inkluzivas nenian asekuron: ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga vojaĝasekuro. La UK ne repagas mendojn (loĝado, ekskursoj k.a.) se la malmendo venas post la limdato. Tial estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno.

### Donacoj

La UK bonvenigas donacojn por:

**Ĝenerala Kaso:** por la ĝenerala subteno al la organizado de UK.

**Adoptaj Gepatroj:** subvencias partoprenon en la Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.

**Fondaĵo Canuto:** helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.

**Fondaĵo Claude Nourmont**: subtenas kulturajn aranĝojn dum la Universalaj Kongresoj kaj ĝenerale.

**Fondaĵo Partoprenu UK-on:** helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.

**Blindula Kaso:** helpas al blindaj kongresanoj.

**Arta Kaso:** helpas financi artistojn por prezentiĝo dum Universalaj Kongresoj.

**Infana kongreseto:** helpas kovri kostojn de Internacia Infana Kongreseto.

**Klimato – $CO_2$:** por ekologiaj projektoj, kompensantaj la poluadon, okazantan i.a. pro transportado de kongresanoj al UK.

Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo *Esperanto*.

# Sekvu nin ĉe:

- uk.esperanto.net
- **Telegram-grupo:** uk.telegramo.org
- **Facebook** @universala.kongreso
- **Instagram** @universala.kongreso
- uea.org/kongresoj



## Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA!
Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton al akcepto en la Universala Kongreso. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe https://uea.org/alighoj

# Kontaktoj

Centra Oficejo de UEA, Kongresa Fako:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

**Ni petas kontakti nin per la retpoŝtadreso:**

## kongresoj@co.uea.org

Pri ĉiuj temoj rilataj al la Kongreso, bonvolu kontakti ne la LKK, sed la Kongresan Fakon.

## Speciala oferto de la Libroservo

Se vi partoprenos la ĉi-jaran UK, vi povas mendi ion ajn en la stoko de la Libroservo de UEA, kontraŭ kongresa prezo kaj sen sendokostoj. La menditaĵojn vi prenos en la Kongresa Libroservo, kie vi povas ankaŭ pagi por ili, se en via UEA-konto ne estis sufiĉa bonhavo. Por ĝui la oferton, via mendo devas atingi la Libroservon de UEA antaŭ la fino de majo.
Ne hezitu viziti nian retan katalogon kaj mendi tie:
*https://katalogo.uea.org*
Mendojn oni akceptas ankaŭ per simpla mesaĝo al *libroservo@co.uea.org*, telefone (+31 10 436 1044) aŭ letere (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando). Nepre indiku vian UEA-kodon en la mendo.

# Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!




**Eventa Servo** estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde.